**NIA VOĈO**
Madrida Esperanto-Liceo
San Alejandro 6-4°B-Ext. 28005 Madrid
(Nur poŝta adreso)
Ni kunvenas lunde ekde la 18.30h en Rodríguez San Pedro 13-3°-7

Redaktas kaj eraras Lupe Sanz JUNIO 1998

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo: http://www.ciudadfutura.com/esperanto

## HISPANIO

Okaze de la 100a datreveno de la naskiĝo de Federico García Lorca, Andaluza Esperanto-Unuiĝo kune kun Hispana Esperanto Federacio, omaĝis la aŭtoron eldonante, ene de la librokolekto "Hispana Literaturo", lian verkon "Sanga nupto".
Ekde aprilo la esperanto-programo en Radio Klara de **Valencio** ŝanĝiĝis al pli konvena horo, la 17a marde, kaj ankaŭ pligrandiĝis la uzado de esperanto en la elsendo mem.

## JULIO EN VALENCIO

25-30a okazos 1-a Apud Mara Kultura Esperanto-Semajno. Precipe turisma kaj kultura e-evento. Loĝebleco en universitata hotelo "Ausias March", sufiĉe komforta kaj moderna, kvinpersonaj apartamentoj kun kompleta banĉambro (unu dulitan plus tri unulitajn ĉambrojn). Tranokto plus matenmanĝo plus tagmanĝo kostas 3.840 pesetojn tage (por pagoj en julio iom pli). Kontakt-adreso: Augusto Casquero Tel. 96 374 43 99. E-adreso: a-casquero@redestb.es

## JUNULARA KONGRESO

La Internacia Junulara Kongreso okazos de 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto, en Krakovio (Pollando). David Trigo Pérez, el Madrido, deziras trovi kunvojaĝantojn: Kontakt-adreso Avda. Pablo Neruda 6 1°B. 28010 Madrid. Telefono 91 778 18 01.

## ESPERANTO EN AMAS-KOMUNIKILOJ

En "folia kalendaro" (hispane "taco") eldonata de bilbaoaj jesuitoj aperis, en la dorso de la folio de la 17a de decembro, 1997, novaĵo pri la mes-libro en esperanto kaj pri la Virgulino de la Espero, patronino de esperantistaro. César de Mosteyrín sendis la novajo al la eldonejo Ediciones El Mensajero S.A.

## EKSTERLANDE

La Konferenco de UNESCO pri "Povo de la Kulturo", okazinta en Estokholmo je la komenco de aprilo, laŭ peto de ERA (Esperanta Asocio ligita al Radikala Partio de Italio), inkludis rekomendon al la Ĝenerala Direktoro (Parto II. Punkto 14) rilate kreadon de Monda Lingva Observatorio por studi lingvajn politikojn, minoritatajn lingvajn diskriminaciojn kaj aliajn problemojn pri interkomunikado. Pli da informoj: http//www.unesco-sweden.org/Conference/F_Action.htm

## KONGRESOJ KAJ RENKONTIĜOJ

1a Apud-Mara Kultura Esperanto Semajno 25-30 julio. Valencia
83a UK Montpeliero (Francio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto
84-a UK Berlino (Germanio). 1-a ĝis 8-a de aŭgusto 1999
6-a Esperanto Semajno de la Kulturo kaj Turismo. 3-10a oktobro. Calafell (Tarragona)

## *KOTIZO POR 1998 KUN DONACO*

*La kotizo por tiu-ĉi jaro estas sama ol la lastaj **ses** jaroj. Bv. se vi ankoraŭ ne abonis ĝin **sendi ĉekon po 2.000 pesetojn,** je la nomo de ESPERANTO-LICEO DE MADRID. Antaŭ-dankon pro via kontribuo al daŭrigado de MEL. **Se vi pagas rekte al la kasisto en nia kunveno, lunde vespere en Rodríguez San Pedro 13-3°-7) vi ricevos kiel donacon esperantan T-ĉemizon***

### HEF ANGULO

**Lunde** kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson (91) 446 80 79

Manuel Pancorbo, HEF-ano kiu loĝas en Galapagar (Madrid), estas la persono kiu zorgas pri la **gazetara servo** de HEF. Li sendas regule al la plej gravaj hispanaj ĵurnaloj, nov-agentejoj kaj radio-stacioj novaĵojn pri la esperanto movado precipe en Hispanio sed ankaŭ en la tuta mondo. Pro sia laboro estas necese ke li ricevu akurate (kelkaj semajnoj antaŭe) la diversajn programerojn kaj novaĵojn. Ĉiuj E-grupoj devas sendi anoncon kaj novaĵojn al Pancorbo la adreso: <liven@nexo.es>

### RESUMO DE ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO DE HEF

Ĉeesto de 41 membroj 6 estraranoj.

**Ratifo de la modifoj faritaj en la statuto de Fundación Esperanto** pro devigo fare de la nova leĝo pri fondaĵoj.

**Kotizoj por 1999** Oni reprenas iaman decidon ke la kotizaro kresku ĉiujare laŭ la ĝenerala kresko de prezoj (IPC 2,1), rondigante al la supra cento: Ordinara Membro 4.100; Patrona Membro 8.200; Kolektiva Membro 8.200; Emerita Membro (nur por tiuj kiuj havis tiun kategorion en 1995) 3.300; Dumviva Membro 247.100 pesetojn.

**58-a Hispana Kongreso de Esperanto.** Organizos la venontjaran kongreson la grupo "Verda Rondeto" de Castellón.

**Demandoj, petoj, proponoj.** Antonio Valén raportas pri la nuna stato de la **granda vortaro Hispana-Esperanto**, ĉar li kunordigas la laborojn de reviziado. Li klarigas ke la teksto estos definitive preta en la venonta jaro; ke por ebligi ĝian eldonon oni devos kolekti antaŭmendojn, kaj ke ĝi aperos ankaŭ sub formo de kompakta disko. Jesús de las Heras sugestas oferti ĝian eldonon al Sopena kaj al Instituto Cervantes. Luis Serrano demandas pri la **flago** kiu tradicie prezidis la hispanajn kongresojn ĝis la jaro 1996. La sekretario respondas ke ŝajne ĝi restis en Murcio antaŭ du jaroj kaj oni klopodos ĝin rehavi por uzi ĝin ĉiujare.

### VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

## LICEO TRANSLOKIĜIS

**Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h, ĉe HEF, RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7** Tel. 91 446 80 79. Jam ne funkcias nia sidejo en Atocha.

La adreso de San Alejandro nur estos por poŝtaj kaj oficialaj aferoj. (La dirección de San Alejandro sólo debe ser usada para el correo y asuntos oficiales).

**Kursoj:**

Centro Cultural "Maestro Alonso" (kvartalo Ventas). Merkrede 18.30 ĝis 20.00.
Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18
HEF-CO. Koresponda kurso

**Prelego:** Lumbildoj de Valladolido, sidejo de HEF Kongreso

ESPERANTO LICEO DE MADRID
San Alejandro 6-4ºB.Ext
28005 Madrid
Asociación de Utilidad Pública Municipal